

Kaj iu el tiuj "oni" nun aperas – ni kredu aŭ ne – en la persono de la iama prezidanto de la Akademio, kiu intertempe, laŭ mia malkompleta percepto, nur elstaris per strangaj landnomaj reformoj kaj renverso de la Esperanta skribsistemo. Se mi ne estus kuŝinta dumleĝe de lia artikolo "Majuskloj aŭ minuskloj en etnomoj" en LA GAZETO n-ro 116, mi estus falinta pro ŝoko, kiam mi legis la nomon de la aŭtoro. Mi opiniis min en alia jarcento, legante: "Ni devas inteligente sekvi la Fundamenton, provante paraleligi ĝin al la ordonoj de la racio".

Jes, ja, fine ankaŭ tiu sinjoro iom komprenis la esencon de la lingvo Esperanto. Sed kiom da luktoj, kvereloj, insultoj, agacoj, kalumnioj okazis intertempe. Kia malŝparo da tempo! Kiom da energio perdiĝis ĉe ĉiu unuopa Esperantisto pro malobeo al la racio kaj strangaj interpretadoj de la Fundamento! Mi mem bedaŭras, ĥoleras, ke mi perdis tiom da tempo pro lingvaj demandoj. La vivo vere ne estas malkompliĝa. Sed tiaj luktoj pri laŭdire racia lingvo? Eksteraj homoj tion ne eltenus. Prave.

Ne pli da tempoperdo. Al sinjoro Albaŭlto mi nur povas rekomendi la samon. Se li kaj aliaj "spertuloj" estus fakte legintaj la Ŝulcan verkaron, tiam ili ne farus ree kaj ree la samajn esplorojn – kun, finfine – Ŝulcaj rezultoj! Ili ne plu devus analizi la Fundamenton kaj pripensi "idealajn regulojn". Pri la nuna problemo de *Albault*, Rikardo Ŝulco tiam nur citis Zamenhofon: "La radikoj restu senŝanĝaj". Kaj sufiĉe. Nenecesa tiu tuta artikolo Albaŭlta.

Nenecesaĵoj mia kaj pliaj replikoj. Ni Esperantistoj uzu, disvastigu Esperanton laŭ la gvidaj intencoj de ĝia aŭtoro. Kaj tiuj gvidaj intencoj estis kaj estos – se fakte iam la homaro akceptu neŭtralan internacian lingvon – facileco, unueco kaj racieco. Nur tiam nia lingvo restos por la estonteco de la vera "*Homo sapiens*" necesa, inda, viva kiel iam la ĝangale kreskintaj etnolingvoj.

Adreso de la aŭtoro

Franz-Georg RÖSSLER

Am Mönchsbusch 6

DE – 67373 Dudenhofen / GERMANIO

<rozsas@web.de>

Priaŭtoro informo

Muzikinstruisto, komponisto, pentristo, Esperantisto.



Kunekzisto de formalismo kaj mensismo/realismo en la genera gramatiko de Chomsky: Kaŭzanto de teoriaj debatoj

Hiroshi NAGATA

Resumo

Rilate al la naturo de sia genera gramatiko *Chomsky* ŝanĝiĝis de formalismo al mensismo/realismo. Li difinis de tiam la celobjekton de la genera gramatiko tiamaniere, ke ĝi koncernas la mensan realecon de lingvoparolanto. Kontraste al la ŝanĝo, li tamen daŭre observis formalismon kiam li analizis la sintaksajn strukturojn de frazoj. Tiu ĉi artikolo argumentas, ke la kunekzisto de tiuj du filozofiaj tezoj kaŭzis kaj kaŭzas inter diversfakaj esploristoj grandajn debatojn en tri esplorniveletoj, nome: Kio konsistigas lingvoscion? Kiamaniere ĝi estas akirita? Kiel ĝi estas aktuale uzata? La kunekzisto formas ĝuste la fonton, kiu rifuzas empirian falsadon de lia genera gramatiko.

Enkonduko

Diskutante denaskismon pri lingvoakiro de *Chomsky* ("Ĉomsko" en la sekva teksto konforme al Esperanta ortografio, escepte dum referencado), ni konkludis (*Nagata* 2005a), ke la Ĉomska denaskismo devenis de lia egaligo de la genera gramatiko kun la lingvoscio kiu, li asertas, estas posedata de lingvoparolantoj. Tiu ĉi konkludo baziĝis antaŭ ĉio sur la fakto, ke Ĉomsko ŝanĝis sian filozofian tezon de formalismo al mensismo/realismo ĉirkaŭ la fino de la 1950-aj jaroj. En tiu analizo, ni interpretis, same kiel multaj fakuloj koncernaj, ke ekde tiam Ĉomsko ne plu estas formalisto sed mensisto/realisto. Tamen tiu ĉi konkludo ŝajnas ne adekvata. Pli precize, kvankam unuflanke Ĉomsko estas efektive mensisto/realisto, li aliflanke estas plenplena formalisto. Li neniom forlasis la formalismon. Ĝi ankoraŭ vivas senŝanĝe ekde la komenco ĝis la nuna tempo, firme kunligite kun lia metodologio analizi sintaksajn strukturojn de frazoj.

Tiu ĉi artikolo argumentas, ke la kunekzisto de tiuj du tezoj, kaŭzis kaj kaŭzas teoriajn debatojn en tri esplorniveletoj, pri kiuj la Ĉomska entrepreno de genera gramatiko okupiĝas: 1.) Kio konsistigas la lingvoscion?, 2.) Kiamaniere ĝi estas akirita?, kaj 3.) Kiel ĝi estas uzata?

Formalismo kaj mensismo/realismo ĉe Ĉomsko

Kiel klare montrite fare de *Steinberg* (1975, 1976), Ĉomsko komencis sian generan entreprenon kun neniom da mensismo/realismo. Kontraŭe, li rifuzis ĝin tiel forte, ke "enkonduko de dispozicioj (aŭ mensistaj terminoj) aŭ estas senrilata aŭ trivialigas la teorion" (*Chomsky* 1955, citita el *Steinberg* 1975, p. 223).⁽¹⁾ Sekve Ĉomsko kiel formalisto rigardis la gramatikon nur kiel formalan sistemon, kiu generas por iu lingvo ĉiujn el la gramatikaj frazoj kaj neniun el la negramatikaj frazoj, en la sama maniero kiel dedukta teorio donas aron da aksiomoj. La gramatiko estas formala aparato kiu distingas gramatikajn disde negramatikaj frazoj, liverante al frazoj ties strukturajn priskribojn. Estas prave, kiel ni indikis (*Nagata* 2005a), ke en la tiam Ĉomska teorio plenumis gravan rolon lingvaj intuicioj en la senco, ke li celis "konstrui simplajn gramatikojn, kiuj klarigas la lingvajn intuiciojn de la denaskaj lingvoparolantoj kaj kiuj donas al ili substancon" (*Chomsky* 1955, citita el *Steinberg* 1975, p. 224). Tamen, ĉi tiu lingva intuicio ne konsistigis la gramatikon mem atribueblan al la lingvoparolantoj; ĝi nur rolis kiel kriterio, laŭ kiu teoriado de gramatiko estis prijuĝata.

Malgraŭ tio, en la daŭro de la 1960-aj jaroj li fariĝis mensisto kaj sendube ĝis la 1965-a jaro plena mensisto en la senco de la vorto. Li tial asertis, ke "[l]ingva teorio (lia genera gramatiko) estas mensista, ĉar ĝi okupiĝas pri la eltrovado de mensa realeco ene de aktuala agado" (*Chomsky* 1965, p. 4, rondaj krampoj aldonitaj) kaj ke "ĉiu lingvoparolanto estas mastruminta kaj interniginta generan gramatikon, kiu esprimas lian lingvoscion" (*Chomsky* 1965, p. 8). Tiam ĉi li rigardis sian gramatikon kiel abstraktan priskribon de mensa fenomeno reale ekzistanta ene de la homa menso, asertante ke la gramatiko formas la lingvoscion posedatan de ĉiuj lingvoparolantoj. Lia genera gramatiko do koncernis ne lingvan sed mensan realecon. Lingvistiko, ĉi-tiele, fariĝis "la aparta branĉo de psiĥologio pri sciado (angle *cognitive psychology*)" (*Chomsky* 1968, p. 1).

Ĉomsko certe fariĝis mensisto/realisto; tamen, tio ĉi okazis nur sole rilate al filozofia tezo pri la naturo de la genera gramatiko. Rilate al

esplormetodologio li restis sensanĝe firma formalisto. La kunekzisto de tiuj ĉi tezoj ene de la Ĉomska genera gramatiko kaŭzis diversspecajn debatojn en la tri esplorniveletoj supre menciitaj.

Debatoj pri lingvoscio

Ĉomsko nun asertas, ke la gramatiko konsistigas la lingvoscion de lingvoparolantoj. Ĉu ekzistas iuj empiriaj pruvoj kiuj subtenas lian aserton? Laŭ niaj scioj plejebaj, li ankoraŭ ne prezentas empiriajn pruvojn sufiĉe precizigitajn, ĉar lia prezentado estas ĉiam nur fragmenta kaj sporada, bazita nur sur lia introspektado. *Chomsky* (1980a) plejofte karakterizas la lingvoscion tiamaniere, ke gramatika kompetenteco, unu el la bazaj elementoj de la lingvoscio, estas sistemo de reguloj, kiuj generas kaj rilatas mensajn reprezentantojn (angle *mental representation*), inkluzive specife de reprezentantoj de formo kaj signifo. Tiuj ĉi reguloj funkcias konforme al iuj aŭ aliaj ĝeneralaj principoj. La reguloj, se temas pri la angla (*Chomsky* 1980a), inkludas, ekzemple, tiun, kiu translokas demandotan vorton al la fronto de frazo aŭ tiun, kiu kunligas anaforan esprimon kiel "each other (sin reciproke)" al ties respektiva antaŭanto. Apartaj principoj abstraktaj kaj ĝeneralaj de homaj lingvoj kaj tial atribueblaj al la homa lingva fakulto (angle human *language faculty*) regas la aplikadon de iuj aŭ aliaj reguloj. Tiu-rilate, oni povus diri, ke lingvoparolantoj scias, kvankam nekonscie, tiujn ĝeneralajn principojn.

Malgraŭ ke Ĉomsko asertas, ke lingvoparolantoj posedas la lingvoscion, li tamen montras neniom da scivolemo pri tio, kiel stas aktuale tiu lingvoscio en ordinaraj kaj aktualaj lingvoparolantoj. Anstataŭe li kreis koncepton de abstrakta lingvoparolanto al kiu li atribuis sian generan gramatikon, karakterizante tiun lingvoparolanton kiel idealigitan lingvoparolanton (precize, idealan parolanton/aŭdanton laŭ *Chomsky* 1965; tamen, mallongigite, idealigita lingvoparolanto en la suba teksto). La idealigita lingvoparolanto posedas plenan de la lingvoscio, neniom kaj neniam regebla de diversspecaj influoj de mensaj okazaĵoj aktualaj. Ĉomsko do skribas: "[l]ingva teorio (genera gramatiko) primare koncernas idealan parolanton/aŭdanton kiu, en plene homogena parolkomunumo, plene scias sian lingvon kaj ne estas regebla, kiam li/ŝi aktuale utiligas lingvoscion, de tiuj kondiĉoj kiuj ne rilatas al gramatiko kiel limoj de memoro, distraĵoj, turniĝo de atento kaj intereso, kaj eraroj (hazardaj aŭ nehazardaj)" (*Chomsky* 1965, p. 3, rondaj krampoj aldonitaj, escepte de la lastaj). Tiu ĉi ab-

strakta estaĵo posedas lingvoscion, kiun Ĉomsko nomis kompetenteco (angle *competence*), distingante ĝin de plenumado (angle *performance*), t.e. aktuala uzado de lingvo en konkretaj situacioj. Ne estas bezone aldoni, ke la genera gramatiko pritraktas ne la plenumadon sed la kompetentcon, ĉar la lasta kaŭzas la unuan, kiel Ĉomsko klare skribas, ke "la lingvoscio estas la bazo por parolanto/aŭdanto kiam li aktuale uzas sian lingvon" (*Chomsky* 1965, p. 9).

La koncepto de idealigita parolanto kune kun la koncepto de kompetenteco kiel ties posedaĵo donis al Ĉomsko metodologian bazon por insisti, ke lia lingva teorio celas la mensan realecon de lingvoparolantoj, tute ne zorgante pri tio, kiel aktuale statas la lingvoscio posedata de aktualaj lingvoparolantoj. La aktuala stato de lingvoscio ne estas la kompetenteco sed nur la plenumado, pri kiu ne okupiĝas lia genera gramatiko. Armite per la du konceptoj, nur sufiĉus, se li daŭre observus kiel formalisto sian esplormetodologion ĝistiaman. Ankaŭ sufiĉus, se li aldonus al sia gramatiko mensismajn / realismajn implicojn, neniom ŝanĝante sian formalisman esploron. La kunekzisto de formalismo kiel esplormetodologio kaj mensismo / realismo kiel interpretado de la genera gramatiko persistis, tute sendepende de kelkaj revizioj faritaj en lia genera gramatiko de *Chomsky* (1957) ĝis *Chomsky* (1995).

Tiu ĉi nekonsekvenco inter formalismo kaj mensismo/realismo okazigis al Ĉomsko prezenti skribaĵojn ne facile kompreneblajn. Ekzemple, kvankam li emfazas, ke "genera gramatiko provas specifi tion, kion la parolanto *aktuale scias*, sed ne tion, kion li/ŝi *raportus* pri sia lingvoscio" (*Chomsky* 1965, p. 8, kursivigoj aldonitaj); li tamen neniam studas la aktualan staton de tiu lingvoscio posedata de lingvoparolantoj aktuale vivantaj en aparta lingvokomunumo. Certe ekzistas du implicoj en la Ĉomska koncepto de "parolanto". Ĝi implicas unuflanke aktualajn parolantojn, kiam li parolas pri parolantoj, kiuj, li asertas, akiras kaj posedas la generan gramatikon. Ĝi aliflanke implicas la idealigitan parolanton, kiam li parolas pri la celobjekto de la genera gramatiko kaj kiam li plenumas formalan analizon de gramatiko. Sekvis do el tio atendita situacio: neniam ĉesis kaj ĉesas levi sin diskutoj pri tio, kiel aktuale statas la lingvoscio posedata de aktualaj – kontraste al la idealigitaj – lingvoparolantoj. Ĉu ili posedas la generan gramatikon karakterizitan fare de Ĉomsko? Iuj defiantoj asertas, ke tio, kion akiras kaj posedas lingvoparolantoj, konsistas ne el la abstrakta kaj formala genera gramatiko sed nur el multe da specifaj ek-

zempleroj de apartaj eldiroj (ekz. *Tomasello* 2003). Aliaj defiantoj asertas, ke lingvoscio estas unu speco de tia lerteco, kia ne malsamas al la lerteco observata ĉe biciklorajdanto (*Devitt* 2006). Tiuj ĉi du grupoj de defiantoj montras simpatian al tiuj esploristoj, kiuj okupiĝas pri analizado de sciado surbaze de konektismo (angle *connectivism*, ekz. *Rumelhart & McClelland* 1986; *Elman* 1991). Kompreneble, troviĝas esploristoj (ekz. *Katz* 1981), kiuj ne subtenas la Ĉomskan realistan starpunkton, asertante, ke gramatika fenomeno estas esence abstrakta, nek mensa nek reala.

Ĉiuokaze, Ĉomsko ankoraŭ ne sukcesas konvinki la defiantojn pri tio, ke la lingvoscio posedata de aktualaj lingvoparolantoj estas ĝuste tio, kion konsistigas la genera gramatiko, pri kies konstruado li daŭre okupiĝas nur pere de formala analizado. La mensa realeco de lia gramatiko, ni devas diri, ne validus alie ol ene de la idealigita lingvoparolanto.

Debatoj pri lingvoakiro

Ne necesus pli da skribado pri la Ĉomska teorio de lingvoakiro, ĉar ni jam priskribis tion ĉi aliloke (*Nagata* 1997a, 2005a, 2005b). Nepras nur rememori, ke laŭ la Ĉomska genera gramatiko (*Chomsky* 1986) esploro de lingvoakiro sekvas esploron de lingvoscio. Principe, la Ĉomska teoriado de lingvoakiro konsistas el tri fazoj. La unua fazo estas priskribi la staton de lingvoscio, kiun atingas infanoj rezulte de lingvoakirado. La dua estas doni priskribon al la lingvomaterialoj, al kiuj elmetas sin la infanoj. Kaj la tria estas kompari la akiritan staton de lingvoscio kun la ecoj de la lingvomaterialoj, indiki sekvante la grandan malegalecon inter la stato de lingvoscio kaj la ecoj de la lingvomaterialoj spertitaj, kaj fine postuli universalan gramatikon denaske donitan por bone klarigi la malegalecon. En tiu ĉi teoriado plej gravas tio, kiel statas la du komparatoj, nome: la stato de lingvoscio atingita kaj la ecoj de lingvomaterialoj spertitaj. La stato de lingvoscio, ne necesas aldoni, egalas al la scio de la Ĉomska genera gramatiko, plena de riĉeco, komplekseco kaj abstrakteco, dum la ecoj de la lingvomaterialoj, tute kontraste al tio, estas malriĉaj kaj degenercaj. La "granda malegaleco inter scio kaj sperto" (*Chomsky* 1968, p.78) estas, laŭ Ĉomsko, konkerebla nur pere de postulado de universala gramatiko kiel komenca stato de lingvoakiro.

La universala gramatiko do ebligas al infanoj atingi la finan staton de lingvoakiro. Tamen kiel ekzakte statas la universala gramatiko, an-

koraŭ ne estas precizigite. Ĝi sendube enhavas en si principojn kaj kondiĉojn sintaksajn, pri kies specifoj ni ankoraŭ ne estas sufiĉe informitaj. Ankaŭ rilate al parametro-fiksado konvinkeblaj informoj ankoraŭ ne estas prezentitaj. Klare estas, ke neniel finiĝus lingvoakiro sukcese nur se plenumiĝas la kondiĉo, ke iuj aŭ aliaj parametroj estas fiksataj. Necesas longa daŭro de pluraj jaroj – multe pli ol tri aŭ kvar jaroj, malsame al onidiroj asertataj – por atingi sufiĉan nivelon de lingvoakiro (vd. ekz. *Chomsky* 1969, kiel unu el la kontraŭaj pruvoj). Tiurilate, la koncepto de momenta lernado (angle *instantaneous learning*), ni devas diri, estas nenio alia ol fikcio. Plue, la Ĉomska modelo de parametro-fiksado enhavas en si strangan kontraŭdiron, ĉar por ke la parametro-fiksado bone ekfunkciu, necesas antaŭ ĉio antaŭa analizado de sintaksaj strukturoj de frazoj. Alie, lia modelo de parametro-fiksado neniel povas decidi, kiun parametron ĝi apliku en kiu specifa frazstrukturo, kiel klare montris kelkaj esploristoj (ekz. *Mazuka* 1996; *Tomasello* 2003; *Devitt* 2006). Tio ĉi sugestas, ke antaŭ ol infanoj komencas fiksi parametrojn, ili devas jam posedi sufiĉe da scioj pri sintaksaj strukturoj de frazoj. Sen tiaj sintaksaj scioj antaŭirantaj neniam povus ekfunkcii la parametro-fiksado. Nome, la parametro-fiksado ne kaŭzas akiron de lingvoscio; anstataŭe, antaŭa akiro de lingvoscio kaŭzas la fiksadon de parametro. Ne inverse.

Ĉiuokaze, tiu ĉi situacio kaŭzis debatojn pri tio, kiamaniere oni klarigu lingvoakiradon ĉe infanoj. La debatoj estas tre grandaj (vd. *Elmann et al.* 1996, *Cowie* 1999, *Tomasello* 2003, *Russell* 2004, *Sampson* 2005, pri kelkaj ekzemploj de tiaj debatoj). Tamen ĉiaj debatoj, ni povas diri ankoraŭfoje, devenas de tio, ĉu oni akceptas aŭ ne akceptas la tezon, ke la lingvoscio posedata de lingvoparolantoj konsistas el la Ĉomska genera gramatiko.

Debatoj pri lingvouzado

Rilate al aktuala uzado de la genera gramatiko, Ĉomsko ne ĉiam estas konsekvenca. Tial li skribas unuflanke: "Sendube, racia modelo de lingvouzado enhavas en si, kiel ties bazan konstruparton, la generan gramatikon, kiu esprimas la lingvoscion de parolanto/aŭdanto" (*Chomsky* 1965, p. 9) kaj "Ŝajnas, ĝenerale, ke plenumado-modelo kiu enkorpiĝas generajn gramatikojn estas fruktodona studo; plue, estas malfacile imagi alian bazon sur kiu evoluus teorio de plenumado" (*Chomsky* 1965, p. 15).

Tamen, en pli nuntempaj artikoloj li estas iom konfuza pri la rilato

de la genera gramatiko – en tiu ĉi okazo, sintaksa komponanto – al ties uzado, aparte se ĝi estas metita kontraŭ la sistemo de plenumado. Ekz. li skribas: "[ĝ]enerale lingvo ne estas facile uzebla aŭ 'konstruita por uzado' " (*Chomsky* 1995, p. 18) kaj "estas konate, ke grandaj partoj de lingvo estas 'neuzeblaj' kaj uzeblaj partoj ŝajnas formi ĥaosan kaj 'neprincipan' segmenton de la tuta lingvo" (*Chomsky* 1995, p. 29). Ĉomsko asertas, ke kvankam "[l]a fundamenta kondiĉo kiun lingvo devas kontentigi estas tio, ke la lingvo estu uzebla kaj ke la persono kiu havas la lingvon povu ĝin uzi" (*Chomsky* 2002, p. 148), li tamen skribas aliloke, ke "ne havas klaran sencon la ideo, ke lingvo estas 'konstruita por uzado' aŭ 'bone adaptita al ties funkciadoj' " (*Chomsky* 1995p. 168). Tiu ĉi diskuto pri neuzebleco de lingvo iras tiel fore, ke li asertas, ke "la tuta arĥitekturo de la menso eble ne estas bone konstruita por uzado" (*Chomsky* 2002, p.107). Tiaj ĉi asertoj, ankoraŭfoje, devenas de la Ĉomska analizado de lingvo kiel formala aparato. Tion ĉi oni facile povas kompreni pere de lia multfoja aludo al nekontinua senfineco (angle *discrete infinity*), t.e. la trajto, kiun, Ĉomsko rigardas, la lingvo entenas en si kaj kiu estas trajto neordinara inter biologiaj sistemoj (ekz. *Chomsky* 1988, 1995, 2000; *Hauser*; *Chomsky & Fitch* 2002). La nekontinua senfineco estas trajto simila al natura nombro, kiu konsistas el senfina sinsekvo de nekontinuaĵoj unuoj (1, 2, 3, ...). Ankaŭ frazoj havas samspecan trajton en la senco, ke frazoj konsistas el sinsekvo de nekontinuaĵoj vortoj kaj ke la nombro de vortoj ene de frazo grandiĝas senlime, se oni enmetas unu frazon post la alian, kunigante ilin sinsekve per la uzo, ekzemple, de rilata pronomo "kiu". Estas facile kompreni, ke ankaŭ tiu ĉi trajto de nekontinua senfineco devenas de formalista analizo de lingvo.

La mensista/realista interpretado de la genera gramatiko tuj kaptis la atenton de psiĥolingvistoj, kiuj en la 1960-aj jaroj ek esploris ĉu la genera gramatiko estas aktuale uzata fare de aktualaj lingvoparolantoj (ekz. *Miller & McKean* 1964; *Savin & Perchonock* 1965). Tamen, post la malsukceso de la teorio de komplekseco de derivado (angle *theory of derivational complexity*) la psiĥologio forlasis la modelojn de la genera gramatiko kaj provis elpreni esplormodelojn el la psiĥologio mem, ne plu fidante al la valideco de la genera gramatiko kiel la modelo de plenumado. La Abstrakta Gramatiko de Plenumado (angle *Abstract Performance Grammar*) de *Osgood* (1980) estas unu el tiaj provoj. Tiurilate, esploroj proksimume en la 1970aj jaroj estis esprimitaj kiel "psiĥolingvistiko sen lingvistiko" (*Johnson-Laird* 1976).

Tamen, okaze de la apero de nova teoria versio, t.e. teorio de principoj-kaj-parametroj (Chomsky 1981) reviviĝis la psiĥolingvistiko bazita denove sur la modelo de la genera gramatiko. Aperadis multaj esploroj, kiuj provis trovi pruvojn kiuj signas la funkciadon de iuj aŭ aliaj sintaksaj principoj aŭ kondiĉoj (ekz. Crain & Nakamura 1989; Fodor 1989; Grimshaw & Rosen 1990; Thomas 1991; Gradzinsky & Rainhart 1993; Gibson & Hickok 1993; De Vincenzi 1996; Clahsen & Featherston 1996; Lidz, Waxman, & Freedman 2003). Sekvis kompreneble kritikaj esploroj. Plej rimarkinda, el la vidpunkto de esplor-ideo, estas tiu de McKoon & Ratcliff (2003), kiu traktis prilaboradon de frazoj surbaze de sintakso determinita de signifo anstataŭ surbaze de signifo determinita de sintakso. La lasta maniero de prilaborado devenas de la Ĉomska modelo de la genera gramatiko, nome: sintakso estas primara, dum semantiko kaj fonetiko estas dua-grada, tiel ke sintaksa strukturo de frazo unue konstruita en la sintaksa komponanto transiras al du sekvantaj komponantoj, semantika kaj fonetika. Psiĥolingvistikan modelon de tiu ĉi prilaborado plej tipe spegulas modelo proponita de Frazier kaj ŝiaj kunlaborantoj (ekz. Rayner, Carlson & Frazier 1983; Frazier & Rayner 1982). McKoon & Ratcliff (2003) kritikis do tiajn modelojn de prilaborado de frazoj ekskluzive bazitaj sur sintakso. Ankaŭ ni prezentis dubojn pri kelkaj sintaksaj principoj, esplorante ĉu ili aktuale estas uzataj kiam aktualaj lingvoparolantoj juĝas la gramatikecon de frazoj kiuj malobservas iun aŭ alian principon (Nagata 1995, 1997b, 2003, 2004, 2005c, 2006; Nagata & Bain 2000). La lingvoparolantoj montris datumojn ne konformajn al la principoj. Tamen restas nekonstanteco rilate al empiriaj esploroj de principoj de la genera gramatiko. Tiun ĉi situacion kaŭzas la genera gramatiko mem precipe pro tio, ke tiuj aŭ aliaj principoj aŭ kondiĉoj asertitaj kiel validaj en iu versio de la teorio estis plene forlasitaj kiel nevalidaj en sekvanta versio.

Ankoraŭfoje rilate al la uzado de la genera gramatiko, debatoj sin levis kaj daŭras ili sen iom da rimarkeblaj signoj de solviĝo. Kiel supre menciite, Ĉomsko estas ambigua rilate al tiu ĉi problemo kaj ne okupiĝas pri ĝi. Tio ĉi estas aparte pro tio, ke uzado de lingvo apartenas al plenumado de lingvo, aŭ E-lingvo laŭ pli nuntempa termino, kiu estas nur la produktaĵo de kompetenteco aŭ I-lingvo. Kaj kompetenteco aŭ I-lingvo estas efektive tio, kion celas lia genera gramatiko. La problemo de uzado trovas sin ekster lia genera gramatiko, kiel li klare montras: "uzado de lingvo ... certe ne povas fariĝi la efektiva

esplorobjekto de lingvistiko (genera gramatiko)" (Chomsky 1965, p. 4, krampoj aldonitaj). Li asertas, ke "principoj bazitaj sur pruvoj derivitaj de juĝadoj fare de informantoj estas pruvitaj pli fruktoplenaj kaj surprizaj ol tiuj, kiuj baziĝas sur pruvoj derivitaj de eksperimentoj pri prilaborado kaj similaj." (Chomsky 1980b, p. 200). Malgraŭ lia kredo, ni emfazis, ke la lingva intuicio, al kiu Ĉomsko donas plenan fidon (vd. ekz. Chomsky 1975, p.37; 1980b, p.200)⁽²⁾ estas unu aspekto de plenumado de lingvo, kiel kelkaj esploristoj indikas (ekz. Bever 1970; Mathew 1979; Osgood 1980; Wasow & Arnold 2005) kaj kiel ankaŭ ni emfazis kelkloke (Nagata 1988, 2001, 2004, 2005c, 2006). Unufraze, Ĉomsko neniel povas esplori teorion de genera gramatiko senhelpe de lingva plenumado.

Konkludo

En la Ĉomska genera gramatiko kunekzistas du fundamentaj tezoj filozofiaj, nome: formalismo kaj mensismo/realismo. Ĝenerale, Ĉomsko estas rigardata kiel mensisto/realisto, kiel Ĉomsko mem insistis (Chomsky 1975, p. 37), kvankam la fakto estas, ke almenaŭ ĝis la fino de la 1950-aj jaroj li estis formalisto, sekve li analizis sintaksajn strukturojn de frazoj, tute ne zorgante pri la ontologia naturo de sia genera gramatiko. Lia lingvoteorio do havis nenian implicon pri la mensa realeco. Tamen, ĉirkaŭ la komenco de la 1960-aj jaroj li ŝanĝis sian filozofian tezon de formalismo al mensismo/realismo. Li rigardis ekde tiam sian gramatikon kiel koncernantan ĝuste la efektivan realecon de menso/cerbo.

Tiu ĉi interpretado faris plej grandajn efikojn ne nur sur la lingvistikon sed ankaŭ sur aliajn esplorkampojn, kaŭzante inter esploristoj diversajn debatojn rilate al tri esplorniveleoj, nome: la naturo de lingvoscio, akirado de lingvoscio, kaj uzado de lingvo. La formalista karakterizado de la genera gramatiko igis Ĉomskon difini ties celobjekton kiel mensan realecon de idealigita lingvoparolanto, tiel ke la genera gramatiko fariĝis imunigebla kontraŭ ĉiuj eblaj empiriaj falsadoj. Tamen lia teoriado de genera gramatiko principe ne eblas senhelpe de lingvaj intuicioj – unu aspekto de aktualaj lingvaj plenumadoj – kiun li uzadas kiam li analizas sintaksajn strukturojn de frazoj. La demando tial daŭras: ĉu eblas efektive fina scienca pruvado de la mensa realeco de lia genera gramatiko, kondiĉe ke ĝi restas enkatenigita fare de la du tezoj kontraŭstarantaj?

Notoj

(1) Ĉar ne haveblis la originala verko de *Chomsky* (1955) ni anstataŭe uzis ĉi tiun citaĵon el *Steinberg* (1975).

(2) Tute ne komprenebla estas la Ĉomska rimarko: "ili [konceptoj kiel 'boneformita' (angle *well-formed*) kaj 'gramatika' (angle *grammatical*)] plenumis efektive neniu rolon aŭ en la unuaj aŭ en la postaj verkoj pri genera gramatiko, escepte kiam ili estis neformale prezentitaj" (*Chomsky* 1995, p. 213, rondaj kaj rektaj krampoj aldonitaj). Anstataŭe, laŭ nia kredo, sen la koncepto de gramatikeco nek eblis nek eblus lia tuta entrepreno de genera gramatiko. Similan surprizon montras ankaŭ *Seuren* (2004, p. 121).

Referencoj

Bever T. G. (1970). The cognitive basis for linguistic structures. En J. R. Hayes (Red.), *Cognition and the development of language* (pp. 279-362). New York: Wiley.

Chomsky C. (1969). The acquisition of syntax in children from 5 to 10. Cambridge, MA: MIT Press.

Chomsky N. (1955). The logical structure of linguistic theory. Cambridge, MA: MIT Library (Microfilm). Citita de *Steinberg* (1975).

Chomsky N. (1957). Syntactic structures. The Hague: Mouton.

Chomsky N. (1965). Aspects of the theory of syntax. Cambridge, MA: MIT Press.

Chomsky N. (1968). Language and mind. New York: Harcourt Brace Jovanovich.

Chomsky N. (1975). The logical structure of linguistic theory. New York: Plenum.

Chomsky N. (1980a). Rules and representations. *Behavioral and Brain Sciences*, 3, 1-61.

Chomsky N. (1980b). Rules and representations. New York: Columbia University Press.

Chomsky N. (1981). Lecture and government and binding. Dordrecht, Holland: Foris.

Chomsky N. (1986). Knowledge of language: Its nature, origin and use. New York: Praeger.

Chomsky N. (1988). Language and problems of knowledge. Cambridge, MA: MIT Press.

Chomsky N. (1995). The minimalist program. Cambridge, MA: MIT Press.

Chomsky N. (2000). New horizons in the study of language and mind. Cambridge, UK: Cambridge University Press.

Chomsky N. (2002). On nature and language. Cambridge, UK: Cambridge University Press.

Claahsen H. & Featherston S. (1999). Antecedent priming at trace positions: Evidence from German scrambling. *Journal of Psycholinguistic Research*, 28, 415-437.

Cowie F. (1999). What's within? Nativism reconsidered. Oxford: Oxford University Press.

Crain S. & Nakamura M. (1987). Structure dependence in grammar formation. *Language*, 63, 522-543.

De Vincenzi M. (1996). Syntactic analysis in sentence comprehension: Effects of dependency types and grammatical constraints. *Journal of Psycholinguistic Research*, 25, 117-133.

Devitt M. (2006). Ignorance of language. Oxford: Oxford University Press.

Elmann J. (1991). Distributed representations, simple recurrent networks, and grammatical structure. *Machine Learning*, 7, 195-225.

Elmann J. L. et al. (1996). Rethinking innateness: A connectionist perspective on development. Cambridge, MA: MIT Press.

Fodor J. D. (1989). Empty categories in sentence processing. *Language and Cognitive Processes*, 4, 144-209.

Frazier L. & Rayner K. (1982). Making and correcting errors during sentence comprehension: Eye movements in the analysis of structurally ambiguous sentences. *Cognitive Psychology*, 14, 178-210.

Gibson E. & Hickok G. (1993). Sentence processing with empty categories. *Language and Cognitive Processes*, 8, 147-161.

Grimshaw J. & Rosen S. T. (1990). Knowledge and obedience: The developmental status of the binding theory. *Linguistic Inquiry*, 21, 187-222.

Grodzinsky Y. & Reinhart T. (1993). The innateness of binding and coreference. *Linguistic Inquiry*, 24, 69-101.

Hauser M. D., Chomsky N. & Fitch W. T. (2002). The faculty of language: What is it, who has it, and how did it evolve? *Science*, 298, 1569-1579.

Johnson-Laird P. N. (1977). Psycholinguistics without linguistics. En N. S. Sutherland (Red.), *Tutorial essays in psychology* (p.75-135). Hillsdale, NJ: Erlbaum.

Katz J. J. (1981). Language and other abstract ideas. Oxford: Basil Blackwell.

Lidz J., Waxman S. & Freedman J. (2003). What infants know about syntax but couldn't have learned: Experimental evidence for syntactic structure at 18 years. *Cognition*, 89, B65-B73.

Mazuka R. (1996). Can a grammatical parameter be set before the first word? Prosodic contributions to early setting of a grammatical parameter. En J. L. Morgan & K. Demuth (Red.), *Signal to syntax: Bootstrapping from speech to grammar in early acquisition* (pp. 313-330). Mahwah, NJ: Erlbaum.

Matthews P. H. (1979). Generative grammar and linguistic competence. London: George Allen & Unwin.

McKoon G. & Ratcliff R. (2003). Meaning through syntax: Language comprehension and the reduced relative clause construction. *Psychological Review*, 110, 490-525.

Miller G. A. & McKean K. A. (1964). A chronometric study of some relations between sentences. *Quarterly Journal of Experimental Psychology*, 16, 297-308.

Nagata H. (1988). The relativity of linguistic intuition: The effect of repetition on grammaticality judgments. *Journal of Psycholinguistic Research*, 17, 1-17.

Nagata H. (1995). On-line and off-line reflexive resolution in Japanese logophoric sentences. *Journal of Psycholinguistic Research*, 24, 205-229.

Nagata H. (1997a). Kernvorto-parametro en genera gramatiko: Apliko al eldiroj de infanoj denaske lernantaj Esperanton. *Scienca Revuo*, 48, 34-43.

Nagata H. (1997b). An assimilation effect in judging the grammaticality of sentences violating the subadjacency condition. *Perceptual and Motor Skills*, 84, 755-767.

Nagata H. (2001). Judgments of grammaticality of Japanese bitransitive sentences with a differing number of arguments. *Perceptual and Motor Skills*, 92, 997-1005.

Nagata H. (2003). Judgments of grammaticality of Japanese sentences violating the principle of Full Interpretation. *Jl of Psycholinguistic Research*, 32, 693-709.

Nagata H. (2004). Faulty Japanese sentences are judged more grammatical when punctuation is used: Negative implications for Chomsky's principle of Full Interpretation. *Perceptual and Motor Skills*, 99, 325-336.

Nagata H. (2005a). Deveno de denaskismo pri lingvoakiro de Chomsky. *Scienca*

Revuo, 56, 81-86.

Nagata H. (2005b). Konstanta stato kiel lingvoscio ĉe Chomsky: Ĉu ĝi estas efektive stabila kaj unuforma? *Scienca Revuo*, 56, 81-86.

Nagata H. (2005c). The role of emphasis and argument order in the judgments of grammaticality of Japanese bitransitive sentences violating Chomsky's principle of Full Interpretation. *Psychologia*, 48, 1-13.

Nagata H. (2006). Judgments of grammaticality of Japanese simple sentences involving two arguments in a whole-part relation: A further examination of Chomsky's principle of Full Interpretation. *Perceptual and Motor Skills*, 102, 855-870.

Nagata H. & Bain B. (2000). Judgments of grammaticality of sentences with a differing number of arguments: A comparison of English and Japanese speakers. *Perceptual and Motor Skills*, 91, 503-511.

Osgood C. E. (1980). *Lectures on language performance*. New York: Springer-Verlag.

Rayner K., Carlson M. & Frazier L. (1983). The interaction of syntax and semantics during sentence processing: Eye movements in the analysis of semantically biased sentences. *Journal of Verbal and Verbal Behavior*, 22, 358-374.

Rumelhart D. E. & McClelland J. L. (1986). On learning the past tenses of English verbs. En *Parallel distributed processing*. Vol. 2. (pp. 216-268.) Cambridge, MA: MIT Press.

Russell J. (2004). *What is language development?* Oxford: Oxford University Press.

Sampson G. (2005). *The 'language instinct' debate*. Revised ed. London: Continuum.

Savin H. B. & Perchonock E. (1965). Grammatical structure and its immediate recall of English sentences. *Jl of Verbal Learning and Verbal Behavior*, 4, 348-353.

Seuren P. A. (2004). *Chomsky's minimalism*. New York: Oxford University Press.

Steinberg D. D. (1975). Chomsky: From formalism to mentalism and psychological invalidity. *Glossa*, 9, 218-252.

Steinberg D. D. (1976). Competence, performance and the psychological invalidity of Chomsky's grammar. *Synthese*, 32, 373-386.

Thomas M. (1991). Universal grammar and the interpretation of reflexives in a second language. *Language*, 67, 211-239.

Tomasello M. (2003). *Constructing a language: A usage-based theory of language acquisition*. Cambridge, MA: Harvard University Press.

Wasow T. & Arnold J. (2005). Intuitions in linguistic argumentations. *Lingua*, 115, 1481-1496.

Adreso de la aŭtoro

Prof. Hiroshi NAGATA

Department of Clinical Psychology

Kawasaki University of Medical Welfare

288 Matsushima, Kurashiki 701-0193 / JAPANIO

hinagata@mw.kawasaki-m.ac.jp

Priaŭtoro informo

La aŭtoro estas profesoro pri psiĥologio kaj speciale studas psiĥolingvistikon rilate al lingvoscio kaj ties akirado fare de denaskaj parolantoj.



La lingva diverseco de Eŭropo prezentita je la esprimo por “tombejo”

Wolfgang VIERECK

1. Enkondukaj rimarkigoj

Ĉi tiu geolingvistika artikolo estas rezulto de mia laboro pri la *Atlas Linguarum Europae*, al kiu mi estas ligita ekde 1992 en diversaj funkcioj, ekde 1998 kiel prezidanto. Ĝi daŭrigas la vicon de kontribuoj, kiujn mi verkis pri diversaj aspektoj de tiu projekto (kp. Viereck 2001, 2004, 2006). Post la etimologiaj klarigoj sekvas semantikaj, precipe kulturhistoriaj rimarkigoj. La plej multaj menciitaj esprimoj estis enketitaj kadre de la eŭropa lingvoatlaso, nome per la demando

„*Quel est dans votre dialecte le nom du terrain où se trouvent plusieurs de ces endroits?*

[Kio estas en via dialekto la vorto por la tereno en kiu troviĝas pluraj tiaj lokoj?]

Senpere antaŭe oni demandis:

„*Quel est dans votre dialecte le nom du trou dans la terre où l'on met le mort?*

[Kio estas en via dialekto la vorto por la truon en la tero, en kiun oni metas la mortintojn?]

2. Etimologiaj konsideradoj

Ĉi tie mi disigas inter hindeŭropaj kaj ne-hindeŭropaj lingvoj. Mi komencas per la unue nomitaj, kiuj estis kaj estas klare dominantaj en Eŭropo. Kompreneble la nova formaĵo *tombejo* en Esperanto ne estas pritraktata. La deriva silabo "-ej" signifas lokon, kie troviĝas – tiukaze – tombo(j).